# KOMITATO de 23-a de marto 2026

Lundon la 23-an de marto 2026, de la 20a ĝis la 23a kunvenis pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ELEKTO * | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | **20/22/24** | R | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | **2025** | R | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | **22/24** | R | | | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Victor | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | 2025 | R | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | 2025 | R | | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | | R | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | | R | | | |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | | R | | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | | R | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | | R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / ILEI-Francio | | R | | | |
| Briac | MILLON | BM | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | | R | | | |

19 ĉeestis el 19, 0 senkulpiĝis, 0 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min
XG prezidas, VS kaj MP protokolas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj**
- Libro de Hannes Larsson Murder in Pont-a-Mousson (ni ne havis tempon pritrakti)
- ŝanĝo de la statutoj de UEA
- por la agadraporto ĉu ni devas sekvi la novan formon proponita de UEA : AKIRI
- agadraporto por EEU peto de Luigi Fraccaroli

0.4 **Dato de la venontaj kunsidoj** 4 min
- rete lundon 11a de majo je la 20a (unu semajno antaŭ la kongreso)

- fizike dum la kongreso, post la membrokunveno sabaton 23a je la 16a

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Financa raporto 2023/2024.** **DISKUTO** 10 min
Bezono fermi la bilancon antaŭ la posta jaro. EEK kaj eksterordinara eldono de libroj kaŭzis esceptan jarrezulton.

**Financa raporto 2024/2025**

- restas la stoko-valorigo farenda. Kun la takso de Paul, la rezulto estus negativa (-5000/-6000 eŭroj)
- ni planas ke la raporto estu preta unu monato antaŭ la kongreso.

1.2 **Protokolo de la lasta komitatkunsido** **DISKUTO** 5 min
https://esperanto-france.org/IMG/pdf/ufe-komitato-2026-01-25-protokolo.pdf

1.3 **Aliĝilo 2025/2026: lokaj kotizoj + donacoj** **INFORMO** 5 min
585 aliĝintoj hodiaŭ (524 samdate lastan jaron, 596 fine de la aliĝperiodo). Ni antaŭvidas ke ni sukcesos superi la nombron de la antaŭa jaro.
Saïd sendis inviton al realiĝi al la homoj kiuj ne faris tion ĝis ekde la 3 lastaj jaroj
XG sendis informon al la respondeculoj de la lokaj grupoj por informi pri la kongreso, kaj sendos baldaŭ la liston de la klubanoj kiuj ne realiĝis al Esperanto France.
BV deziras ricevi la liston de la esperantistoj kiuj estas membroj de Esperanto France kaj ne membroj de la loka klubo.

1.4 **Preparado de la 2026a ĝenerala asembleo** **DISKUTO** **10** min

- Preparado de la jara raporto. Raporto pri la agado de la diversaj lokaj kluboj/federacioj : oni raportu la eksterordinarajn aŭ novajn agadojn. Kutime multaj redirajôoj kompare kun antaŭaj jaroj do ni strebu plifaciligi la legeblecon
- Listo de kandidatoj por la venonta ĝenerala asembleo (lasta KK). XG jam proponis al la kluboj proponi agadon kun Esperanto France al la klubanoj
- Ni aldonis novan kolumnon "ELEKTO" en la supra tabelo de tiu protokolo, kiu informas pri la elektojaroj de la komitatanoj elektitaj de la membroj: Bruno Flochon finas sian trian 2 jaran mandaton kaj ne rajtas rekandidatiĝi ĉi jare. Michaël-Boris Mandirola finas sian duan du-jaran mandaton. Aleks Kadar finas unujaran mandaton. Ambaŭ ili rajtas rekandidatiĝi ĉi jare.
- Mankas agadraportoj de federacioj, dankon al la koncernataj federacioj zorgi pri tio.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : nova logo, faldfolio** **DISKUTO** 10 min
Esperanto Jeunes petas propran version de la logotipo. Petoj venu al BF aŭ Emmanuelle.
Artikolo en LME por prezenti la novan logotipon, estos skribata ke helpo povas esti petita por uzi la novan logotipon por aliaj asocioj.
Flugfolio atendas la revenon de Emmanuelle fine de Marto.
Kalendaretoj devos esti pretaj antaŭ septembro por ke ili estu disponeblaj por la nova jaro, diskutinda antaŭ la somero.

2.2 **Trejnad-sesioj** **INFORMO** 5 min
Propono de nova kunveno pri Arthur kaj reta varbado de novaj membroj dum la baldaŭaj semajnoj.
Marc Olivier Graziani, prezidanto de la grupo de Liono, diris al Bruno R. julie 2025, ke li uzas la metodojn uzitajn en la firmaoj kaj poste adaptiĝi al la novaj lernantoj. Li povas prezenti la metodon dum malpli ol horo kiun li uzas sed nun li estas malpli disponebla. Li nur povus fari ion dimanĉe. Bruno R. rekontaktos lin.
XG proponas kunvenparton por prezenti la programon de la kongreso kaj respondi al demandoj (merkrede aŭ vendrede vespere aŭ sabate/dimanĉe post la 19a). La 8a aŭ la 15a de aprilo.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

### 3.1 *Le Monde de l'Espéranto* — DISKUTO 5 min

Rezultoj pri la lasta kunveno de la teamo :
La enhavo de la LME estas preskaŭ preta. Necesas prezenti la federaciojn. Emmanuelle Richard komencos labori pri ĝia enpaĝigo komence de aprilo.

### 3.2 Esperanto Aktiv — INFORMO 5 min

La 25an de aprilo aperos la marta-aprila numero. Laŭeble plifruigi eventuale je almenaŭ unu semajno por varbi pri la kongreso aŭ aperigi eventuale apartan malgrandan numero… La lastajn kontribuaĵojn oni sendu ĝis la 10-a de aprilo. (por atingi la daton de aperado Interkonsente kun ER)

### 3.3 Kongreso 2026 — INFORMO 15 min

Stato de la nombro de aliĝoj 72, bezono de plia reklamo por kreskigi ĝin. Mapo regule ĝisdatigita montras la regionojn de la aliĝintoj.
Nur 100 lokoj por la bankedo, supozeble la lastaj aliĝontoj ne povos partopreni ĝin. Nur 7-8 aligîntoj al la postkongreso.
Invito estis ĵus sendita de XG duafoje al ĉiuj membroj, kaj samtempe al ĉiuj partoprenintoj de la kongreso de Nantes.
Kreado de kongresa jutuba kanalo por samtempa elsendado sed por tio bezonatas 50 abonantoj.
Necesas skribi al ĉiuj aliĝintoj pri la programeroj menditaj. Proponi antaŭaliĝi al la kantateliero.

La libro "Ne plu ludo" de Norbert Barthelmess kiun ni pensis donaci al la kongresanoj sed estas iom erotika alineo. Kion ni povos fari de tiuj libroj ? Kunporti kelkajn dekojn por lasi je dispono kun averto.
La libro "infanoj de malriĉuloj" de John A. Lee, eldonita de SAT: ĉu ni povas donaci ĝin ?
La libro "La Normandaj rakontoj" de G. de Maupassant kiu estas en Greziljono, ĉu donaci estas interese ? La temo estas adaptita.
2 renkontoj pri libroj estas planitaj. Eblas havi pliajn okazaĵojn por prezenti aliajn librojn.
Je la fermo de la kongreso, la prezentoj de la kongreso de SAT, de UEA kaj 2027 EEK eblos.

### 3.4 Kongresoj 2027 kaj 2028 — DISKUTO 10 min

ĉu denove pli ampleksa kongreso en 2027 kiel en Strasburgo?
Kongreso 2027 en Marsejlo aŭ apuda urbo. 2 kongresejoj eblaj. Ĉar la Universaia Kongreso estos en Melburno, do eblas organizi eŭropan kongreson. Ĉu en la jura fakultato en Marsejlo kun antaŭa buĝeto de 24 000 eŭroj aŭ en Carry le Rouet (Hotel Mileade *village club*, eks-VVF) kun antaŭa buĝeto de 80 000 eŭroj, kotizoj inter 260 ĝis 430 eŭroj por 2 ĝis 3 noktoj ĉio estas inkluzivita. Ambaŭ kazoj estas por 300 partoprenontoj.

Ĉu aliaj landoj akceptas komunan kongreson? Kiom da partoprenantoj venus el tiuj landoj? Kiun kongresurbon ni elektu? Aperas ke pluraj eventoj en simila situacio estas sukcesaj: kongresoj de italoj, britoj aŭ eventoj kiel Novjara Renkontiĝo kiuj kunvenigas homojn en sama loko dum pluraj tagoj.
→ Por Mileade, aprobita unanime krom unu sindeteno.
De vendredo la 14-a ĝis 17-a de majo 2027. Eventuale postkongreso en La Ciotat aŭ en Aix en Provence.
La unua flugfolio pri la kongreso 2027 estos disponebla en Caen : Eŭropa Kongreso de Esperanto 2027 en Provenco.

Kongreso 2028 organizota de Norda federacio. Ĝi favoras organizi kongreson en Norda Francio en 2028 okaze de la 125 jariĝo de la federacio. Ni plu pripensas ĉu en Lillo, ĉu en Araso. Ĉu nacia nur franca kongreso aŭ ĉu kun belgoj (kutimas kun Benelux). Laŭ kutimo, komuna markola (Kent, Belgio, Norda Francio) kongreso ĉiun 3an jaron reprenebla.

XG proponas fakan liston kaj RC kunvenojn pri kongresorganizado al kiuj ni invitu tiujn kiuj jam havas sperton pri kongresorganizado por helpi la organizantojn de sekvaj kongresoj. Indas ankaŭ scii ke ekzistas dediĉita dosierujo en nia guglo-dosierujo (petu al la estraro por la ligilo).

### 3.5 Projektoj pri Arkivoj — INFORMO 5 min

Preparo de nova subvencipeto kiel lastan jaron, limdato 31 marto kun respondo dum junio.

3.6 **Starigo de teamo pri prelegvojaĝoj** **DISKUTO** 5 min
kun naciaj kaj regionaj respondeculoj, ĉu novaj proponoj de prelegvojaĝantoj?
Dennis Keefe povas veni dum la venonta jaro.
Bruno R. kontaktos iun kiu li jam proponis.

3.7 **Rilatoj kun la federacioj kaj la lokaj grupoj** **DISKUTO** 5 min
Komence de la monato, membrokunveno de federacio Esperanto-Okcitanio aprobis kunlabori kun UFE.

3.8 **Malfacila situacio de Kvinpetalo, ebla helpo de UFE** **DISKUTO** 5 min
Vidu mesaĝon de membro de Kvinpetalo kun reago de XG. Nenio nova pormomente.

3.9 **Ambiciaj projektoj de Greziljono, ebla apogo de UFE** **DISKUTO** 5 min
novaĵoj pri la situacio. La gehungaroj kiuj loĝas tie estas feliĉaj kaj planas daŭrigi la sperton.

3.10 **Venontaj eldonoj** **INFORMO** 5 min
Atendo je reveno de Emmanuelle por diri pli precize.

3.11 **UK 2026 en Graz Aŭstrio** **INFORMO** 5 min
816 partoprenantoj inter kiuj 73 Francoj.
Dua Bulteno: ĝi aperis la 10an de marto. Kiel antaŭkongreso eblas partopreni la 1an Kongreson de Virinoj.
Ŝanĝoj en statutoj por kongruigi statutojn de UEA kun la leĝaro de Nederlando. Por devigaj ŝanĝoj venos baldaŭ peto voĉdoni al asocioj kaj membroj.

3.12 **Situacio de Vinilkosmo** **DISKUTO** 5 min
Okazis inundo en la Vinilksomo-loko kaj novaj ŝanĝoj de distribuo por la elsendo de muziko kiu kostus multe pli ol antaŭe. Ni povus helpi per kolekto de donacoj. Vinilkosmo eble proponus abonadon interalie al asocioj, ni tiam povus pagi la abonon per la mono kolektita.

## 4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj..)

4.1 **Ekzamenoj** **INFORMO** 5 min
Pri KER: Niveloj B1, B2, C1 kaj C2 dum UK kaj venontaj ekzamenoj en Greziljono dum “Printempas” aprilo 2026 ĝis C1
Retaj ekzamenoj okazos dum julio 2026
Pri FEI: dum kongreso en Hérouville saint Clair.

**4.2 Metodo 12** **INFORMO** 5 min
Atendo reveno de Emmanuelle por diri pli precize.

**4.3 Aliaj eldonoj** **INFORMO** 5 min
Pluraj en preparo, iuj devus preti por vendo dum la venonta kongreso.